

修証一如

Vervekiĝo kiel ekzercado

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

釈尊は29歳で出家し、6年ないし7年の苦行を経て、35歳で覺りに達せられた、と伝えられています。そして多くの仏伝では、この覺りの前後に悪魔の誘惑について語っています。いわゆる「降魔成道」といわれるできごとですが、これは正確に言うと、「悪魔の誘惑を退けて成道した」のではなく、苦行時代にも成道以後も悪魔の誘惑があったのです。たとえば『雑阿含經』には次の記述があります。

「あるとき尊師は、王舎城の<鷲の峰>という山にとどまっておられた。そのとき尊師は、夜の暗闇のなかで戸外で露地に座しておられた。雨がしとしとと降っていた。さて、悪魔・悪しき者は、尊師に髪の毛がよだつような恐怖をおこさせようとして尊師に近づいた。近づいてから、尊師から遠からぬところで、次々と大きな岩石を山頂からつき落として砕いた。そのとき尊師は、「これは悪魔・悪しき者である」と知って、悪魔・悪しき者に向かって、詩をもって語りかけた。「たとい<鷲の峰>全体が震え動くことがあろうとも、完全に解脱したブッダたちは、動揺することがない。」

(大正蔵第2巻、p.285)

Ŝakja-munio forĵetis sian hejmon kaj post asketa vivo dum 6-7 jaroj atingis vervekiĝon, kiam li estis 35-jaraĝa. Multaj biografiaj tekstoj rakontas pri la tento de maraoj (māra) antaŭ kaj post lia vervekiĝo. Tiu ĉi anekdoto estas nomata “Gōma-Jōdō”, kiu signifas, ke Ŝakja-munio plenumis la vojon (de nirvano) konkerinte maraon. Sed ekzakte dirite, tento de maraoj daŭris ankaŭ post lia vervekiĝo. Ekzemple:

“Iam la Majstro restis sur la monto nomata *Gridhra-kuta* (Montosupro de Aglo). Tiam la Majstro sidis eksterdome kaj sentegmente en nokta mallumo. Pluvetis. Tiam marao, malbonulo, intencis timigi la Majstron harhirtige kaj alproksimiĝis al li. Kaj li ne malproksime de la Majstro faligis rokegojn sinsekve el la montopinto tiel, ke ili frakasiĝis en pecetojn. Tiam la Majstro eksciis, “Tio estas la ago de marao, malbonulo,” kaj alparolis al la marao, malbonulo, en verso: “Eĉ se la tuta Montosupro de Aglo skuiĝas, la Budhoj perfekte liberiĝintaj ne ŝanceliĝas.”

(*Taisyō Daizōkyō*, vol.2, p.285)

これは明らかに成道以後のはなしです。悪魔とは、何か誘惑を象徴しているとすれば、釈尊は成道以後も迷い・動揺を抱えていたことになりません。

あるいは梵天勧請のことがあります。釈尊は成道の時点では、自らの覚りを他者に説くことなくそのまま涅槃に入ることを思ったのです。しかし「梵天」の度重なる要請により説法を決意したと言います。これもまた釈尊の迷い・躊躇・葛藤を伝えるエピソードです。

私たちはともすれば、釈尊には（少なくとも成道以後は）迷いはありえなかったはず、と思いがちになります。しかし実際には、完全に迷いが消滅したのではないらしい、と推測することができます。

覚りとは真理の体得です。しかしながら、覚ったからとて、ブツダとなったからとて、人間であり続けることに変わりはありません。超人になるわけではないのです。ブツダは神ではなく人間です。だから漢字の仏（佛）は、人偏を含んでいます。

だからこそ、釈尊は成道以後も一人の修行僧として、他の弟子たちと同じように生活をしました。覚ったから修行は終わり、ではなかったのです。

このことを行の面からいうならば、修行をしてその結果として覚った、修行は手段で覚りは結果だ、ということではないことが分かります。覚っても修行が続きます。むしろ、修行の継続そのものが覚りであり、覚りとは静的

Tio ĉi evidente temas pri la afero post lia vervekiĝo. Se marao simbolas ian tenton, Ŝakja-munio tenis ĉe si heziton kaj ŝancelon ankaŭ post sia vervekiĝo.

Aŭ oni povas citi la anekdoton pri la invito de la Brahmo al prediko. Ŝakja-munio unue volis nirvaniĝi sen prediki la enhavon de sia vervekiĝo al aliuloj. Sed laŭdire li decidis predikon, ĉar Brahmo plurfoje petis de li. Tiu ĉi anekdoto ankaŭ rakontas lian embarason, heziton aŭ ŝancelon.

Ni emas imagi, ke Ŝakja-munio ne devis havi embarason almenaŭ post la vervekiĝo. Sed oni povas konjekti, ke efektive ne plene malaperis embaraso el lia menso.

Vervekiĝo estas profunda kono de vero. Sed li daŭre restis homo, eĉ post kiam li vervekiĝis, aŭ eĉ post kiam li fariĝis Budho. Li ne fariĝis superhomo. Budho ne estas dio sed homo. Fakte ĉina ideogramo esprimanta Budhon inkludas la parton, kiu signifas homon.

Ĝuste tial Ŝakja-munio vivis kiel simpla monaĥo same kiel siaj disĉiploj, ankaŭ post kiam li vervekiĝis. Ne povis esti, ke ekzercado finiĝis post vervekiĝo.

Se diri laŭ la praktika aspekto, oni ne povas diri, ke ni vervekiĝas rezulte de ekzercado, aŭ ke ekzercado estas rimedo kaj vervekiĝo estas rezulto. Ankaŭ post vervekiĝo daŭras ekzercado. Pli ĝuste dirite, la daŭro de

な心理状態をいうのではなく、動的な実践であるとさえいえることができます。これを道元禅師の言葉で「修証一如」といいます。修行と覚り（証果）とは一体である、との意味です。

「それ修証はひとつにあらずとおもへる、すなはち外道の見なり。仏法には、修証これ一等なり。いまも証上の修なるゆゑに、初心の辨道すなはち本証の全体なり。かるがゆゑに、修行の用心をさづくるにも、修のほかに証をまつおもひなかれとをしふ。直指の本証なるがゆゑなるべし。」

（正法眼蔵弁道話）

これは修行を標榜しない浄土仏教についても同じことがいえます。浄土仏教では信心が重視されますが、本来の意味での信心とは、浄土往生および成仏のための手段ではなく、むしろ信心そのものが浄信（チッタ・プラサーダ）として、きわめて涅槃寂靜に近い状態に成長すべきものです。ここでいう信心とは、いわゆる「信仰」のような、合理的知性では理解できないことを「信じ込む」ということではなく、体得したということですから、もはや不動の境地であり、覚りとさえ言うことができます。しかし信心を得たらもはや聞法の必要はないのかと言えば、もちろんそうではなく、死ぬまで聞法は続かねばなりません。

私たち人間は最後まで生死という迷いの存在であり、それゆえに終わらなき道を求めて歩みを続けていくことが大切なのでしょう。

ekzercado mem estas vervekiĝo; ĝi ne estas mensostato stabila sed praktikado dinamika. La majstro Dōgen montris tion “vervekiĝo kiel ekzercado”, t.e. ekzercado kaj vervekiĝo faras unu ne disigeble.

Ekzercado kaj vervekiĝo ne faras unu; jen opinio de nebudhisma instruo. Ĉe budhismo ili ambaŭ egalas inter si. Surbaze de vervekiĝo vi ekzercas. Tial la ekzercado de komencantoj faras la tuton de la esenca vervekiĝo. Ĝuste tial oni instruas okaze de ekzercado, ke vi ne atendu vervekiĝon krom ekzercado, ĉar ekzercado mem rekte montras la esencan vervekiĝon

(*Syōbō-Genzō, Bendō-wa*)

Ankaŭ al purlandismo, kvankam ĝi alte hisas kredon anstataŭ ekzercado, havas komunan ideon. Kredo aŭ *śinjin* en la originala senco ne estas rimedo por naskiĝi en la purlando aŭ fariĝi Budho, sed ĝi kiel pura koro (*citta-prasāda*) devas kreski al la stato tre proksima al nirvano. Ĉi tie *śinjin* ne signifas tiel nomatan kredon, kiu kontraŭstaras al racia intelekto, sed profundan konon. Do ĝi estas stabila mensostato, aŭ eĉ povas esti vervekiĝo mem. Sed kompreneble, ankaŭ post kiam oni gajnas *śinjin*, oni ankoraŭ bezonas daŭrigi lernadon de darmo ĝis la lasta momento.

Ni homoj estas estaĵoj de embaraso aŭ naskiĝo-kaj-morto ĝis la lasta momento; estas grave ĝuste pro tio, ke ni daŭrigu nian paŝon sur la senfina vojo.